# La Bulteneto

Numero 37 ❁ Jaro 2019

DULINGVA MAGAZINO ELDONATA EN VIENO



# PROTEKTU NIAN MARON!

# La Bulteneto

Numero 37 • Jaro 2019

Redaktejo - eldonejo - presejo:

Rudolfinergasse 8/11, 1190 Vieno, Aŭstrio.

La paperan version ricevas donace
Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, Aŭstrio;
aliaj bibliotekoj post peto.

Podofo senpaga.

Tekstoj kaj fotoj: Renate kaj Walter Klag

Unverkäufliche, private Ausgabe – Nevendebla, privata eldono



## 2020 estas Julia Isbrücker-Jaro

https://eo.wikipedia.org/wiki/Julia_C._Isbr%C3%BCcker

# PROTEKTU NIAN MARON!

Kroatio estas unu el la plej ŝatataj landoj por pasigi la feriojn.

La longeco de la kroatia adriatika bordo estas pli ol 6000 kilometroj, se oni inkluzivigas la multajn insulojn kaj golfojn. La strandoj estas ofte rokaj kaj ŝtonaj, malofte sablaj.



*Roko kun truoj, kiujn faris konkoj*





*Akvo, ondoj, ŝtonetoj kaj lumo ĉe la marbordo apud Dramalj, komunumo Crikvenica [crikvénica].*



*La maro antaŭ Crikvenica*



*Sunmalleviĝo okcidente de Rijeka.*




*Tradukita el la kroata lingvo:*
*Ne pluku florojn, kiujn vi ne mem plantis kaj flegis!*

*Tabulo apud Dramalj, komunumo Crikvenica [crikvénica].*

Dum la lastaj jardekoj la kroataj komunumoj klopodadis teni pura la maran akvon. Por informi pri la sekvo de arbitra forĵetado de rubo, la komunumo Crikvenica starigis tabulojn, sur kiuj oni povas legi, kiel longe restas forĵetita rubo en la naturo.




Tiel longe restas rubo en la maro ĝis disfalo:

Papera naztuko: 4 semajnoj
Gazeta papero: 6 semajnoj
Poma kernujo: 2 ĝis 6 monatoj
Alumeto: 6 monatoj
Cigaredo kun filtrilo: 1 jaro
Banana ŝelo: 2 jaroj
Laminata ligno: 4 jaroj
Lakita ligno: 13 jaroj
Plasta sako: 10 ĝis 20 jaroj
Skatolo por trinkaĵo: 50 jaroj
Stiroporo: 50 jaroj
Aluminia ladskatolo: 200 jaroj
Unufoje uzebla vindotuko: 500 jaroj
Plasta botelo: 1000 jaroj
Vitra botelo: Pli ol 1000 jaroj

**Čuvajmo naše more - Protektu nian maron!**



*Rigardo de Dramalj al la insulo Krk*